
tutmonda esperantista junulara organizo

# tejo-TUTMONDE

DUMONATA BULTENO DE TEJO KUN MOVADAJ NOVAĴOJ POR ĈIAJ INDIVIDUAJ MEMBROJ, LANDAJ KAJ FAKAJ SEKCIOJ, KAJ KONTAKTADRESOJ

numero 5/84

septembro/oktobro 1984



# Redaktora Angulo

Jen la nova numero de TEJO-TUTMONDE, kun nova kovrilkapo, kun baldaŭ plennova redaktoro, kun multaj informoj pri movadaj okazaĵoj dise tra la mondo.
Tiun ĉi numeron kunredaktis Andy Künzli kaj Norberto Saletti, kun la helpo de ĉiuj legantoj kiuj sendis informojn kaj alian materialon.
Venonta numero estos grandparte dediĉita al la Internacia Jaro de la Junularo: pri ĝi vi legu artikolon en la postaj paĝoj.
Konsciu, ke tiu ĉi revuo, kies celo estas kunordigi la agadon kaj la informadon ene de la junulara movado, pluvivos pere de VIA kunlaboro: sendu al la redaktora adreso informojn pri okazintaĵoj, pri opinioj, pri kritikoj, pri kio ajn interesas vin rilate la evoluon de la movado.
KUNLABORU!

## Ĉu vi notis la adreson de la redaktoro?

Andy Künzli,
Zumhofstrasse 22
CH-6010 KRIENS LU
SVISLANDO

## SWANWICK: HOMO KAJ MAŜINO EN KONGRESO

Junularo Esperantista Brita festis sian 25an jaron okaze de la 40a IJK, en Swanwick, pasintan julion, en ĉeesto de tricento da kongresanoj el iom-malpli-ol-kvardek landoj. La kongresa temo estis: "Homo kaj Maŝino", kaj tri estis la ĉefaj maŝinoj pri kiuj oni parolis dum ĝi: komputiloj, la "rapidaj kretenoj" (por citi malnovan kaj ne plu aktualan esprimon pri ili), vekigis la atenton de pluraj kongresanoj, kaj interŝanĝo de programoj okazis ĉie ajn; trajnoj, kiuj naskiĝis en Britio antaŭ du jarcentoj, kaj sen kiuj malfacilas imagi la nuntempan mondon (kaj la vivon de Ŝtefan McGill, entuziasmoplena grupgvidanto); kaj bicikloj, la "ĉevalo" kiu portis pedalemulojn ĝis Swanwick karavane, kaj kies tintaj sonoriloj muzikis dum la internacia vespero. Verdire, aliaj du teknikaĵoj kaptis la intereson de la partoprenantoj: la kroketbastonoj, per kiuj multaj ludis sub la sperta gvido de la simpatiega Sally Barton; kaj la bierpumpiloj, el kiuj fluis po pajntoj la tipa brita biero, sed nur en horoj malfacile rememoreblaj far la nebritoj. La bela kongresejo permesis sporti, promeni,ripozi, ktp-i: la sportado interesis ĉiujn, kaj eblis vidi parton de la estraro de TEJO ripozi el la komitata ŝvitado ludante golfon tuj antaŭ la maskobalo (estis amuze vidi prezidanton en policanaj vestoj, vicprezidanton en pastraj vestoj, kaj sekretarion en ĉifonaj vestoj, kiujn li nomas "sia normala vestkutimo"). La kongresanoj "ĝuis" la tipan britan kuiron (mi pardonpetas al britoj, sed ili memoru ke la Swanwick-a slango estis esperantigita angla: io kiel "Ĉu vi kanas givi al mi la bredon?" anstataŭ "Ĉu vi povas doni al mi la panon?") en kongreseja restoracio sen servado ĉe la tabloj kaj ne memserva: la homoj, sidante ĉe longaj tabloj, devis ŝovi al la najbaroj la plenetajn telerojn ĝis la fino de la vico, ricevante tiujn telerojn el la kompatindaj du kiuj malfruis kaj sidis komence de la tablo (esperante en ties honesteco en la porcioj). Kongresejo tre komforta, kiel mi diris: la senŝlosilaj ĉambroj enhavis ankaŭ Biblion, evidente nur en la angla, kiun oni povis uzi por spertiĝi en la lingvo. Tiu neŝlosebleco, tamen, kreis problemojn al la LKK, ĉar multaj homoj, ne tro fidante en la kristaneca memdisciplino de la aliaj, petis meti valoraĵojn en la sekurŝrankon de la kongresejo, petante ilin rehavi en la plej maltaŭgaj momentoj. La ekskurso gvidis nin tra la brita montetaro, eĉ al bestoĝardeno, kie ni devis solvi enigmojn kaj serĉi linkojn (linkojn? Jes, linkojn!). Pluraj festoj, dancoj, kantoj (tiuj ĉi, tamen, malpli ol en antaŭaj jaroj: ĉu la junularo de la okdekaj jaroj preferas danci en diskoteko ol kanti en plenaero?) kompletigis la tre IJK-eskan etoson. Post la IJK, pluraj vojaĝis al Londono, por viziti la Londonan Klubon kaj aŭskulti la Londonan Koruson, kaj peti gastigon por la sekva semajno al la tre afablaj, sed, mi vetas, tre mirigitaj londonanoj; se ĵurnalisto estus vizitinta la klubsidejon en tiu vendreda posttagmezo, li estus vidinta tricenton da homoj, junaj kaj ne, amike klaĉante en la Internacia Lingvo. Kaj la restado plilongiĝis, pro la striko de la ŝipoj...

KELKAJ SWANWICK-EROJ, far la nova TT-redaktoro.

... kial la Swanwick-a estis aparta Kongreso? Ĉar unue ĝi estis la 40-a, due ĝi okazis en Britio (kongresa sporto estis moki pri Britio), trie ĝian econ karakterizis la orvela jaro (George Orwell, 1903-50, brita aŭtoro, kiu verkis la faman libron "1984")...

... kaj ĝuste en la orvela salono de la kongresejo nokte bruis la diskoteka noktoklubo (kongresa temo: homo kaj maŝino)...

... "damne! kie estas mia ĉambra ŝlosilo?" Ankaŭ la plej ruzaj kongresanoj rimarkis fine de la kongreso, ke la Hayes-domo disponas nur pri senŝlosilaj tranoktejoj. Bela okazo por la junulinoj nokte kaŝiri ĉe...
Nordulinoj ĉe sudulој, sudulinoj ĉe nordulој...

kiam la 'kaj'-loĝantoj volis kontentigi sin duŝante, tiam oni povis spekti fulmrapidajn fuĝulojn kun la ekkrio "fek'!, mi ne volas iĝi rostita porko!". La duŝakvo estis preskaŭ pli varmega ol tiu de gejsiro...

...koncerne la britan bieron, "bedaŭrinde ne estas facile tuj ekscii, kiuj drinkejoj vendas veran bieron (...) krom se oni estas spertulo pri la multaj fabrikmarkoj de la diversaj bieroj" (tiel la kongreslibro); sekve oni ne povis juĝi, ĉu la kongresa drinkejo tiurilate trompis la eksterlandajn verdulojn...

...unu el la ofte aŭditaj kongresanaj sloganoj estis "pro malsato mi jam ne plu malsatas". La manĝoj, pro sia etkvanteco, servis verŝajne nur kiel ekspoziciobjektoj. Sed ekspoziciobjektoj kutime estas bonkvalitaj...

...belgo demisiis kiel TEJO-kasisto. Ne aparte gravis, ĉar belgo anstataŭis belgon...

...kie restis Sergej, Vitalij, Viktor, Alexander, Talis kaj Povilas, kiuj estis vane atenditaj en Swanwick? Eble ni renkontos ilin venontjare en Moskvo okaze de la junulara festivalo...

...ĉu la 42-a IJK en Israelo aŭ ne? La orienteŭropaj kontraŭadoj ne povis eviti, ke fine de la kongreso, la invitiloj por Hajfa '86 troviĝis zorge metitaj apud la matenmanĝa kafotaso...

## EŬROPA PROGRAMO PRI AŬTOMATA TRADUKADO

Fondiĝas, inetrkonsente inter la Eùropa Ekonomia Komunumo kaj ĝiaj membroŝtatoj, programo kies celo estas starigi sistemon por aùtomata traduko el kaj en ĉiujn oficialajn lingvojn de la Komunumo. La programo "Eurotra", kiu daùros kvin jarojn kaj duono, kostos pli malpli 70 milionojn da guldenoj (aù se vi ŝatas la nulojn, 36 miliardojn da italaj liroj...).

## NOVA ESTRARO DE KATALUNA ESPERANTO-JUNULARO

Kadre de la 20a kataluna kongreso en Olot, komence de oktobro, elektiĝis nova estraro de Kataluna Esperanto-Junularo. Prezidanto estas Òscar Puig i Canovas, vicprezidanto Jordi Graells, sekretariino Francesca Moncusí, internaciaj rilatoj Sílvia Simó kaj Arnau Torras, renkontiĝoj Salvador Cruz, varbado enlanda Joaquim Tonda, Núria Inglada, Xavier Carracedo kaj Anna M.Múñoz. Unua ago de tiu ĉi novelektita estraro estis peti detalajn informojn rilate aliĝon al TEJO kiel Landa Sekcio.

## VENEZUELA RENKONTIĜO

En decembro 1983 naskiĝis la Marakajba Esperanto-Klubo, kaj ĝi tre aktivis; lastatempe fondiĝis la junulara kaj infana sekcioj de tiu klubo, kaj loka manifestacio de orient-venezuelaj geesperantistoj okazinta pasintan julion eĉ atingis la ĵurnalojn. La klubo havas malfacilaĵojn atingi legmaterialon: se vi povas helpi ilin, poŝtu al DAVID VALECILLOS, Calle 79 No. 3C-72, MARACAIBO 4002, Venezuela.

## KAT DE TEJO

En Swanwick stariĝis nova komisiono de TEJO, nome KAT, Komisiono pri Aktivula Trejnado: la gvidanto, Jan Koszmaluk el Pollando, vokas ĉiujn aktivemulojn kunlabori. Leteru al li: PL-01-059 Warszawa, ul.Okopowa 43/144, Pollando.

## PRI LA TRIA KOMUNA SEMINARIO EN KOREUJO

Jen modela Esperanto-aranĝo en la kampo de junulara agado. Dum 3 tagoj de la 4a ĝis la 6a de aùgusto en la urbo Ĉonan en Koreujo, entute 146 gejunuloj el Japanujo kaj Koreujo manifestaciis la vivecon de Esperanto per Esperanto-Seminario. Proponita de siatempa Prezidanto de TEJO, s-ro Amri Wandel, en 1980, kaj iniciatita de Korea Esperanto-Junularo, en 1982, la Komuna Seminario inter Japana kaj Korea (Korea kaj Japana) Junularoj havis sian trian lokon en la Universitato Danguk en la urbo Ĉonan, sub la temo "Junulo kaj kulturo". En ĝi partoprenis 39 japanaj kaj 107 koreaj geesperantistoj, kaj prezentiĝis 5 studoj (3 el Koreujo, 2 el Japanujo) pri la temo, kaj 11 studoj (3 el Koreujo, 8 el Japanujo) pri diversaj

fakoj. La partoprenantoj ĝuis ne nur akademiajn programerojn, ekzemple studo prezentojn, diskutojn pri la temo, sed ankaŭ dramajn, sportajn kaj distrajn. Por la unua fojo en la historio de Korea Esperanto-movado tie prezentiĝis pupteatraĵo en Esperanto. Ĝin prezentis la korea pupteatra grupo Sonangdang, kiu planas partopreni en venontjara Pupteatra Internacia Festivalo en Zagrebo. Kaj studentoj el la esperanto-klubo de la japana Universitato Ŭakoo donis freŝan kaj amatoran ridon al la ĉeestantaro per sia komika teatraĵeto "Rakonto pri Hikoiĉi".
Malgraŭ la terura haŭtopika sunbrilo la sangobolaj junuloj verŝis torenton da ŝvito sur la vastan sportejon por venki en la matĉoj de flugpilko kaj piedbasbalo. Sed ne mankis maljunaj junuloj, kiuj pigre ĝuis someran brizon en la maloftaj arbombroj ĉirkaŭ la sportejo. Verŝajne la junulojn pli efike allogis la vespera maskobalo ol la tagaj cerbumigaj diskutoj. Portante tre karakterizajn maskojn, ĉiuj diabletoj ĝisoste amuzis sin per diversaj distraĵoj, reŝarĝante energion al la elĉerpita korpo per la freŝaj fruktoj kaj trinkaĵoj, kiuj abundis en la maskobalejo. Kanto ankaŭ ne mankis. En ombrodona pavilono oni unuigis voĉojn por plibele prezenti "Antaŭ du jaroj", "Mi amas vin", "Pluvo en Paris" ktp. Rondo Harmonia el Japanujo preparis specialan kantaron por la seminario.
Revene al la priskribo de la prezentoj de la studoj pri la temo. Iuj diris, ke la temo "Junulo kaj Kulturo" estas tro abstrakta por efike traktiĝi. La 5 prezentantoj traktis ĉefe la junularan kulturon surbaze de sialanda fenomeno. Kaj plimulto de la partoprenantoj konsentis, ke la junularan kulturon karakterizas la kontraŭstaremo. La prezentoj de fakaj studoj estis tre abundaj kaj diversaj, ekzemple "Lingvo kaj Homo", "Ceramiko kaj Te-ceremonio", "Amaferaj metaforoj en korea etnografiaĵo", "Metapsikio kaj spirita fenomeno", "Subkategoriado de verboj kaj kategoriaj reguloj de Esperanto", "Tradukado de kantoj". Ŝajnis, ke la prezentoj de fakaj studoj estis pli allogaj, ol tiuj de la seminaria temo.
Kaj la lasta programero estis ekskurso al korea folklora muzeo kaj la sanktejo "Hjonĉung-sa", kiu donis al la japanaj samideanoj la ŝancon pli bone kompreni Koreujon kaj ĝian popolon, kaj ankaŭ al la koreaj la ŝancon komprenigi ilin en Esperanto. Post la seminario, dum du tagoj, japanaj esperantistoj ekskursis al diversaj lokoj en kaj ĉirkaŭ Seulo. Sinkritikemaj junuloj eltiras kelkajn mankojn el la seminario, kaj tiel donas eblecon plibonigi la 4an K.S., kiu okazos en Japanujo en venonta jaro. La mankoj estis nesufiĉa zorgado por komencantoj, la abstrakteco de la temo, kaj kelkaj bagatelaj, ekzemple la manko de pantofloj kaj malmulteco de duŝejoj en la loĝejo, manko de aermalvarmigilo en la seminariejo, ktp. Korea Esperanto-Asocio, kunlabore kun la universitato Danguk, sukcesis venigi filmistojn de du televidelsendejoj, kaj raportistojn de diversaj ĵurnaloj. Kaj per tio ni ja manifestaciis la amikecon de ambaŭlandaj junaj esperantistoj kaj la vivecon de Esperanto.

BAK Giŭan

ADRESŜANĜO EN NOVZELANDO

La Nov-Zelanda komisiito pri junularo, kontaktadreso de TEJO, ŝanĝiĝis: la oficon nun tenas

D. RYAN
26 Highfield Plase
Christchurch 4
Nov-Zelando.

ESPERANTO EN TURKIO

Serĉatas junulo(j) por instrui Esperanton en Turkio dum somero 1985. Se vi interesiĝas, skribu petante pli detalajn informojn al Elisabeth SCHWARZER, Kopischstrasse 3, D-1000 BERLIN 61, FRG.

SOMERUMI APUD ADRIATIKA MARBORDO

En bela kaj silenta dometo, en Esperanta rondo, cent metrojn de la Maro, sur la Magistralo inter Split (17 km) kaj Omiŝ (6 km), vi povus somerumi por tre popularaj prezoj. Interesiĝantoj devus skribi al Davor GRGAT, Paićeva 21, 58000 SPLIT, aŭ rekte al la somerumejo: Davor GRGAT, Mali Rat, 58315 DUGI RAT, Dalmatio, Jugoslavio. Por luigado de la ĉambroj, kaj eventuale kuirejo, estas dezirinde skribi antaŭe por certa rezervigado.

SOMERO EN GRESILLON

La Esperanto-Domo en Grésillon anoncas la prezojn kaj la programon de siaj aranĝoj por 1985. Estos pluraj kursoj kaj renkontiĝoj, inter kiuj pri informatiko (fine de aŭgusto) kaj unu kun programo fiksota surloke far la partoprenantoj. Eblas tendumi en la parko, sed nepras ricevi manĝojn en la kastelo. Kotizoj inter 90 kaj 130 FFj por pli ol septaga restado. Informoj ĉe Esperanto-Domo, Grésillon, 49150 Baugé, Francio.

TEATRA FESTIVALO

Inter la 22a kaj la 26a de marto 1985 okazos en Budapeŝto Teatra Festivalo, ĉe la Budapeŝta Teatro "Radnóti". La programo enhavas teatraĵojn de Petőfi, Beckett, Kafka kaj aliaj, kaj inkluzivas pupteatran prezenton. Informoj ĉe HEA, pf.193, H-1368 Budapest).

SISTEMOJ KAJ MODELOJ DE LA PUBLIKA KLERIGADO

Tiu ĉi estas la titolo de kvintaga konferenco en Budapeŝto fine de marto 1985. La programo konkretiĝas nun, kaj ne eblas doni pliajn detalojn. Aliĝoj eblas ĝis la 28a de februaro 1985 (kotizoj ĝis 1800 forintoj. Informoj ĉe HEA (adreso supre).

## RUMANIO

En pluraj rumanaj urboj restadis inter la 3-a kaj 8-a de aŭgusto Andy Künzli, membro de la Komisiono pri Landa Agado de TEJO, por tie esplori la eblecojn organizi junularan rumanan esperanto-seminarion. Tiu vojaĝo realiĝis kiel respondo al kontaktiĝo de TEJO far reprezentantoj de la esperanto-movado en Rumanio.
Semajnoj antaŭ la vojaĝo, gvidantoj de 'Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko' en Timişoara estis demanditaj pri la ebleco organizi renkontiĝon kun esperantistoj de tiu ĉi urbo. Al tio sekvis negativa respondo, tamen kun la mencio, ke ekzistas la revuo 'Ferioj en Rumanio 1983', de kie eblas informiĝi pri la poresperanta aktiveco en Rumanio.
Spite al pluraj objektivaj malfacilaĵoj, kiuj limigis la okazon renkonti rumanajn esperantistojn, Andy Künzli tamen povis paroli kun reprezentantoj de la rumana esperanto-movado.
Ĉefe teknikaj cirkonstancoj tre verŝajne malhelpas organizi tut-rumanan esperanto-renkontiĝon en la proksima tempo.

## JUNULARA ESPERANTISTA BICIKLADO EN GDR 1984

Jam ekde du jaroj, junaj geesperantistoj entreprenas tiun biciklan migradon. Temas pri aranĝo en GDR, kiu konsistas el biciklado kaj tendumado. Ĉi-somere okazis jam la 3a DERSFIB-biciklado, kiu estis aranĝita inter la 20a de aŭgusto kaj la unua de septembro. Ĝi disvolviĝis en tri partoj: unue okazis junulara tendaro ĉe la Balta Maro, de kie estis entreprenitaj pluraj ekskursoj al diversaj urboj de la ĉirkaŭaĵo. Post tio komencis la efektiva biciklado tra ok subdistriktoj ĝis alia esperanto-tendaro. La longeco de la vojo estis 190 km., kaj ni estis survoje tri tagojn. La 28an de aŭgusto ni alvenis en Thomsdorf, kie okazis SEFT (Somera Esperantista Familia Tendaro). De tie ni ekskursis al historia akvomuelejo, partoprenis konkursojn pri retpilko kaj naturo, fine la adiaŭan vesperon. La grupo biciklis en tiu tempo pli ol 400 km. Bona vetero favoris la aranĝon por banado kaj sunbruniĝo. La feriado en norda GDR plaĉis al ĉiu partopreninto. Informojn pri DERSFIB'85 donas: Roland Schindler, Kantstrasse 11, DDR-1273 Fredersdorf.

## SEFT'84

SEFT'84 estis "junulara amuzejo". Lastsemajne de aŭgusto okazis nun jam la sepan fojon la SEFT - Somera Esperantista Familia Tendaro - en la tendaro de Thomsdorf, ĉ. 80 km-ojn norde de Berlino. Ĉi-tendaro situas en pitoreska arbareta pejzaĝo inter du lagoj - sinbanado nuda kaj vestita eblas. Ĉijare kunvenis entute pli ol 80 personoj, inter ili plej granda parto gejunuloj, el, bedaŭrinde, nur tri nacioj (pola, hungara kaj germana). La nombro da partoprenintoj estis subtenita far ĉirkaŭ 20 biciklistoj, partoprenintoj de DERSFIB, kies fina stacio estis partoprenado ĉe SEFT. La programo estis tute libera. Tamen oni aranĝis ekskursojn per aŭtoj, bicikloj kaj ŝipo. Vespere oni povis manĝi specialan manĝaĵon kaj por ĝi oni devis pagi nur 5 markojn por la tuta semajno. Krome estis spekteblaj diapozitivoj diversaj kaj ankaŭ kinejo ekzistis. Ankaŭ okazis du retpilkaj konkursoj inter la SEFT-anoj kaj la DERSFIB-anoj: ĉiu ludantaro gajnis kaj malgajnis unu keston da biero. Je la fino mi ne volas prisilentigi iom malbonan aferon: mankis la amaso eksterlandana... sed sciu, ankaŭ vi estus tre bonvenaj kaj ni eĉ tre atendegas vin. Kotizoj estas tre malaltaj, ĉar oni memprizorgas ĉion bezonatan. Krome mi devus aldoni, ke tiu ĉi SEFT samtempe estis, ĝis nun, la plej granda renkontiĝo de junaj germanaj esperantistoj en GDR. Do, ni atendas vin. Informojn donas Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, distrikta estraro, Jahnstrasse 12, GDR-2000 NEUBRANDENBURG.

Christian Schmitz

## JANŬARAJ JUNULARAJ SKITAGOJ EN ĈEĤOSLOVAKIO

Ĉu vi volas renkonti junajn esperantistajn skiantojn el pluraj landoj de Eŭropo? Ĉeĥa Esperanto-Junularo organizos inter la 14a kaj 20a de januaro 1985 vintran semajnon en la nordbohema montaro Krkonoŝe, kiu garantias bonajn terenojn por alpina skiado kaj skikurado, sed ankaŭ sunon, freŝan aeron kaj restadon en montara kabano. La prezo estas 250 ĉeĥaj kronoj. Bazajn nutraĵojn oni kunportu, ĉar oni mem kuiros la maten- kaj vespermanĝojn. Pliaj informoj kaj aliĝo (ĝis la 15a decembro) ĉe Ĉeĥa Esperanto-Junularo, Jilská 10, CS-110 01 Praha.

## ĈINIO

La 8a numero ĉi-jara de "El Popola Ĉinio" informas, ke la 4/5an de majo 1984 okazis la inaŭgura kunveno por fondi la Sanming-an Junularan Esperanto-Asocion en la urbo Sanming, provinco de Fuĝjan. Tio estas la unua junula esperanta organizo en Ĉinio. Nun pli ol 450 junuloj tie lernas Esperanton, raportas EPĈ.

## INTERNACIA JARO DE LA JUNULARO: ĈU ĜI ESTAS POR LI?

Kiel konate, la jaro 1985 estas la Internacia Jaro de la Junularo: nia movado, pere de komuna komisiono TEJO-UEA, jam ekaktivas en la disvolviĝo de detala agadplano aprobita pasintjare. Tamen, tiu plano plie celas difinitan parton de la mondo, kaj difinitan parton de la homaro: tiun, kiu ne devas ĉiutage okupiĝi pri la plej esencaj bezonoj de la homo, sed eĉ posedas libertempon. Por pruvi tion, mi volas prezenti al vi la ĉi-sekvan artikolon, elprenita el anglalingva publikaĵo; ĝi estas atesto, eble iom tro retorika, pri la vivkondiĉoj de granda parto de la homaro, kiujn oni devas ja solvi kiel eble plej efike kaj rapide, por povi diskuti pri pli subtilaj, alinivelaj temoj. Reagoj al tiu ĉi artikolo estos tre bonvenaj. (N.S.)

La kvarmiliarda homo naskiĝis ie en Azio, Afriko, Latinameriko aŭ Eŭropo. Plej probable li naskiĝis en Azio, kie la situacio estas difinita per scienca termino kiel "demografia eksplodo"... Sed, kia estos la estonto de tiu ĉi infano?... Se li naskiĝis en Hinda Unio, li estos unu el inter miliardo (unu kvarono de la monda loĝantaro) da homoj. Tre probable lia naskiĝloko estis unu el la kabanvilaĝoj svarmantaj de homoj... Probable lia patro estas laboristo en braklaborejo, kaj lia patrino, laca pro la ripetaj akuŝoj, ne havas sufiĉan mamlakton por nutri lin. La prezo de la infana lakto "Nestlé" (aŭ kiu ajn el la multnaciaj konzernoj) estas ekster la akirebleco, kaj lia patrino nutros lin per malmulta rizfaruno boligita per ia akvo apenaŭ dolĉigita per malmulta melaso.
Se li estas vere bonŝanca, li pluvivos, kiel kelkaj el siaj fratoj kaj fratinoj, kaj se li havas iom pli da bonŝanco, li ne estos kaptita far poliomjelito aŭ aliaj malsanoj. Li probable vizitos lernejon en la centro de la kabanvilaĝo, kaj ĉiujare, je Kristnasko, li ricevos kelkajn donacojn el infanoj el tre malproksimaj landoj. "Ili estas vere bonŝancaj", li krios al si mem... Kiam li estas sep- aŭ okjara li apenaŭ kapablas legi kelkajn vortojn en Hindi, sed li certe scias kiel havigi al si kelkajn monerojn pozante por la grandaj reporteroj kiuj fotas lian kabanvilaĝon. Li fumas jam, ekde kiam li estis nur kvinjara: li kutimis pluki la cigaredrestaĵojn en la stratoj... Je la aĝo de dekdu, li lasas la lernejon ne pro tio, ke li ne estas inteligenta, sed pro "manko de lerneja medio", kiel dirus sociologo. En tiu tempo lia patro atingis sian kvaran vivjardekon, kaj tusis; liaj cindroj estos ĵetitaj en la Gangon iun vintran matenon, akorde kun la tradicio. Lia patrino vokos lin ploregante, kaj diros ke nenio estas por manĝi, kaj ke li devos esti la panprovizanto por nutri liajn fratojn kaj fratinojn. Li iĝos metilernanto je sia dekdua jaro, ĉe maŝino dek fojojn pli granda ol lia magra silueto (maŝino ne plu uzita en aliaj landoj, sed tion li ne scios). Je sia dekkvara jaro, li provizos sufiĉe por la pluvivo de sia maljuna patrino, aĝanta tridekkvin: bedaŭrinde neniu el la fratoj pluvivis. Du el liaj fratinoj estis edziniĝitaj, sed estis repudiitaj far la edzoj, ĉar la doton oni taksis nesufiĉa. La jaroj pogute forpasas: lia sola hobio estos iri al

la kinejo kiam oni pagos lin... sonĝi pri landoj kaj popoloj kiuj ne estas malfeliĉaj.
Je sia dekoka jaro, li edziĝos kaj ene de jaro lia edzino naskos etan inon: "Tio estas honto", krios lia patrino...
Jen plena vivo, sen ia ajn surprizo, ne sciante ekzemple kio estas la Internacia Jaro de la Junularo... sed ne estas elirvojoj en la fakto ke multaj aliaj vivas ĝuste kiel li, en pluraj aliaj landoj de nia planedo.

## ALIĜU AL LA IJK 1985

Aliĝu al la 41a IJK, kiu okazos en la Kastelo Eringerfeld (FRG) de la 22a ĝis la 29a de julio 1985. La kotizoj estas inter 150 kaj 370 germanaj markoj. Petu aliĝilojn kaj informojn al LKK: GEJ, Postfach 101422, D-2000 Hamburg 1, FRG.

## ANTIKVO KAJ MODERNO: KION ŜANĜI, KION KONSERVI?

Tiu ĉi estas la temo de la 70a Universala Kongreso, kiu okazos en Augsburg, FRG, inter la 3a kaj la 10a de aŭgusto 1985. Junuloj, malpli ol 26-jaraj je 85 01 01, kiuj aliĝos al la IJK, rajtos je senpaga aliĝo al la UK. Informojn petu de LKK:Seitzstrasse 14, D-8900 AUGSBURG, FRG.

## POSTAJ UKj

La estraro de UEA akceptis kiel kongresurbon por 1986 la ĉinan ĉefurbon, Pekino; eblas jam nun aliĝi: petu informojn ĉe

Universala Esperanto-Asocio
(Centra Oficejo)
Nw Binnenwg 176
3015 BJ Rotterdam
Nederlando

Por 1987 estas jam fiksita, kiel kongresurbo, Varsovio (homoj, ni festos la Jubileon!), kaj por 1988 oni esploras pri la ebleco kongresi en Brisbane (Aŭstralio).

## LABORTENDAROJ 1985

Ĉu tendaro por labori aŭ labori por esti en tendaro? La unua certe ne, la dua plejofte ne. Sed kio estas labortendaro? Granda parto de la junularo ne havas tro da mono por ferii, des pli ne eksterlanden. Pro la internacieco Esperantistoj estas eĉ pli vojaĝemaj (aŭ vojaĝemaj homoj fariĝas esperantistoj). Tial organizantoj de Esperanto-renkontiĝoj klopodas malaltigi (aŭ ne plu altigi) la partoprenkotizon se ili volas havi pli da partoprenantoj. La kotizon eblas malaltigi se estas subvencio aŭ se la partoprenantoj per propra laboro kontribuas. Se sukcesas trovi taŭgan laboron por ĉiuj (kiuj volas) tiel ke la ricevita mono kovru minimume la partoprenkotizon, oni nomas la renkontiĝon LABORTENDARO, eĉ se ĝi ne estas en tendaro (pluraj uzas "laborbrigado", sed ankaŭ ĝi ne montras ekzakte la celon, kaj estas egale kiel ĝi nomiĝas, nur oni konu ĝin). La etoso estas ia speciala, ĉar oni ne nur festas dum la tuta renkontiĝo, sed ankaŭ travivas iom da ĉiutaga vivo en Esperanto-medio. Tio kutime tre plaĉas al la partoprenantoj.

Se vi estas organizanto de renkontiĝoj sciu, ke vi havos multe pli da partoprenantoj se por ili estas senpaga, kaj se vi ne klopodos aranĝi kondiĉojn (ankaŭ) por tiaspecaj partoprenantoj, vi multe bremsas la Movadon, ni perdas multajn esperantistojn.
Se vi estas partoprenunto de Esperanto-renkontiĝoj, kaj ĝis nun malofte aŭ neniam vi estis en Esperanto-medio, ĉar vi ne havas monon por pagi la partoprenkotizon, sciu, ke estas renkontiĝoj, kiuj kostas senpage se vi pretas labori kelkajn horojn tage iun laboron.
Se vi estas leganto de TT (aŭ alimaniere legas ĉi-leteron), sciu, ke TEJO helpas vin en la varbado kaj informado pri labortendaroj, donas konsilojn kiel organizi labortendaron. Informojn pri labortendaroj sendu kaj petu al Sandor Hideg, Fonal u. 18, H-1184 Budapest, Hungario. La listo de konataj labortendaroj aperos en TT kaj ankaŭ sur aparta folio mendebla de marto ĉe la CO. Informojn sendu kiel eble plej frue pro la efika informado, varbado!

Via Sandor Hideg.

ESPERANTO EN UNIVERSITATO ANKAŬ EN ITALIO

Ekde la universitata jaro 1985/86, en la Universitato de Trento, en norda Italio, eblos sekvi esperantologiajn kursojn ĉe la fakultato pri Fremdaj Lingvoj.


**pasporta servo** de tejo




Valizohava Niko, de multaj la amiko,
Ofte vojaĝadas, de Azio ĝis Afriko.
Amasturismon Nik' evitas,
De Serv' Pasporta li profitas;
Imitu lin mondskale: sekvinda laŭ tek-Niko!

La ĝusta tekniko estas tuj mendi la dekunuan eldonon de la listo de gastigantoj de la Pasporta Servo de TEJO. Ĝi proponos al vi pli ol 650 tranoktejojn en 50 landoj. La libreto (kaj la rajto uzi la servon kostas 6 germanajn markojn (aŭ 5 irpk.) inkluzive sendokostojn de HAPS, p/a Germana Esperanto-Junularo, Postfach 10 14 22, D-2000 Hamburg 1, FR Germanio. La sumon vi povas ĝiri al GEJ ĉe pĉk. 337 17-201 (Hamburg). La libreto, kiu cetere enhavas mapojn, estas aĉetebla ankaŭ ĉe multaj landaj perantoj kaj de la Libroservo de UEA (prezo 6,90 gld. plus sendokostoj 10%).